

# Esperanto: komenco, aktualo kaj estonteco

Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a  
Universala Kongreso de Esperanto, Havano, 2010

Redaktis Christer Kiselman

Universala Esperanto-Asocio  
Rotterdam



# Esperanto kiel internacia lingvo en la ombro de la angla

Amri Wandel

**Resumo.** Kiam Zamenhof forĝis la lingvon kiun li nomis Internacia, la okcidenta civilizacio havis plurajn internaciajn lingvojn, depende de la tereno. En diplomatio oni uzis plejparte la francan, en la scienco regis la germana, en teologio la latina, en muziko la itala ... kelkajn jarcentojn pli frue, unu sola lingvo, la latina, plenumis ĉiujn tiujn rolojn, kaj unu jarcenton poste ŝajnas ke denove unu sola lingvo, la angla, transprenis la gvidan rolon en ĉiuj terenoj. Novaj terenoj aperis: informadiko, interreto, sociaj retoj, vikipedio; kaj la angla preskaŭ sole regas ankaŭ en ili.

Ĉu en tia unu-lingva, lingve-centrisma mondo ekzistas vera neceso por aldona internacia lingvo? Kioman ŝancon havas Esperanto en la ombro de la ŝajne absoluta hegemonio de la angla? Ni ja konas la respondojn kiujn ĉiu lernanto de Esperanto absorbas kune kun la dek ses reguloj kaj la fina venko: facileco, neŭtraleco, efikeco, amikeco.

Sed ĉu tiuj magiaj vortoj, kiuj eble sonis logikaj kaj konvinkaj antaŭ duonjarcento, vere validas ankaŭ nuntempe? Multaj aferoj ŝanĝiĝis. La facileco kaj simpleco, kiuj ebligas lerni Esperanton pluroble pli rapide ol etnajn lingvojn, ŝajne malpli avantaĝas: retaj lingvokursoj estas senpagaj, facilaj kaj alireblaj de ĉiuj retahavantoj, kaj komputiloj ebligas tradukadon per tuŝo de butono. La neŭtraleco, kiu estis tre grava argumento en la dividita mondo de la malvarma milito, rapide perdas sian gravecon en la nova erao de la supernacia tutmondiĝo.

Kiel tamen la Esperanto-komunumo restas vivanta kaj eĉ evoluanta? Restas eble nur la idea amikeco aŭ samidaneco, aŭ ĉu pli ĝuste nomi tion sekteco, aŭ moderna versio de homaranismo? Kaj ĉu tio sufiĉas por ke Esperanto havu realan ŝancon iam fariĝi vere internacia lingvo, heredante la rolon kiun la angla ŝajne ludas en la lastaj jardekoj pli kaj pli? Tiujn demandojn ni provu kune formuli kaj respondi.

## Novaj defioj

La grandaj ŝanĝoj okazintaj en la lasta duonjarcento en la monda kulturo, ekonomio, tekniko kaj politiko prezentas antaŭ la Esperanto-komunumo novajn demandojn:

- Ĉu en la nuna lingve unuecema, globala vilaĝo vere necesas aldona internacia lingvo?
- Ĉu Esperanto havas ŝancon iam prosperi en la ombro de la ŝajne absoluta hegemonio de la angla? (Vidu ekzemple Phillipson 1992, Ammon 2002, Rubdy & Saraceni, red., 2006.)

La tradicia respondo estis: “JES, la mondo fine konscios pri la avantaĝoj de Esperanto”. Oni povas resumi tiujn avantaĝojn per la slogano *Facila, neŭtrala, por ĉiuj egala!*

Eĉ en la nuna epoko ne superfluas kaj eble des pli necesas reklami kaj elstarigi tiujn avantaĝojn, apud la aliaj, novaj metodoj, adaptitaj al la nuna mondo.

*Facila* — por lerni, kompreni kaj prononci. La relative malgranda nombro de radikoj (ĉirkaŭ 10% de la nombro de vortoj en la etno-lingvaj vortaroj), la reguleco kaj manko de esceptoj, la koncizeco de la gramatiko kaj la fonemfidelado.

Al la tradicia kritiko ke la esperanta vortprovizo estas eŭropeca kaj tial ĝi estas facila nur por parolantoj de eŭropaj lingvoj kaj ne, ekzemple, por ĉinoj kaj japanoj, oni facile respondas ke la facileco de Esperanto devenas ĉefe de la malgranda nombro de radikoj kaj ne de tio ke ili similas al jam konataj vortoj en etnaj lingvoj. Jes ja, Esperanto estas iom pli facila por konantoj de latinidaj lingvoj, sed ekzemple por ĉinoj Esperanto estas relative pli facila ol la angla, ĉar por ĉinoj la angla estas ankoraŭ multe pli malfacila ol por okcidentlingvanoj.

*Neŭtrala* — kontraŭe al la etnaj lingvoj, Esperanto ne estas ligita al ajna popolo, nacio aŭ nacia kulturo, kaj tial estus pli facile kaj nature akceptebla kiel internacia, interetna komunikilo-lingvo, ĉu en internaciaj organizaĵoj kiel UN kaj la Eŭropa Unio, ĉu tutmonde.

*Egala* — pro ĝia neŭtraleco, al neniuj etnoj aŭ nacioj Esperanto donus avantaĝon estante ĝia patrolingvo kaj nacia kulturo, kaj neniuj etnoj aŭ etnaj lingvoj kaj kulturo estus dominata, minacata aŭ diskriminata se Esperanto fariĝus la internacia komunikilo-lingvo.

Sed ĉu tiuj argumentoj validas kaj konvinkas ankaŭ nuntempe? Ĉu ili taŭgas al la nuntempa mondo, kiu en multaj terenoj estas efektive regata de la angla lingvo?

## Necesaj ŝanĝoj

Pro tiu evoluo kaj ŝanĝiĝo estas necesaj radikalaj ŝanĝoj ankaŭ en la agado, kunordigaj metodoj, strukturoj kaj enhavo de la informada strategio esperanta, por ke ĝi restu efektiva en la nuna mondo. Por entrepreni tiujn ŝanĝojn necesas kreema, vasta strategio kaj aŭdaca iniciatema agado. Oni devas redesenigi la informadon pri Esperanto konforme al la postuloj kaj ebloj de la nuntempo kaj la estonteco (vidu ekzemple Baláž 2010, Pietiläinen 2010).

## *Lingua franca*

Kiam aperis Esperanto, la okcidenta civilizacio havis plurajn internaciajn lingvojn: en diplomatio hegemoniis la franca, en la scienco regis la germana, en teologio la latina, en muziko la itala . . . sed malmultajn jarcentojn pli frue, unu sola lingvo, la latina, plenumis ĉiujn tiujn rolojn. Nuntempe, nur unu jarcenton poste, denove unu sola lingvo, la angla, transprenis la gvidan rolon en preskaŭ ĉiuj terenoj.

Paralele aperis novaj terenoj: informadiko, interreto, sociaj retoj, vikipedio; kaj denove la angla preskaŭ sole regas ĉiujn (vidu ekzemple Crystal 2003, Jenkins 2007). Esperanto devas agnoski tiun situacion kaj adapti sian informadon al la nuna mondo. Ni bezonas novajn argumentojn!

La magiaj vortoj, “neŭtrala, facila, al ĉiu utila”, sonis logikaj kaj konvinkaj antaŭ duonjarcento, sed ili apenaŭ povas konvinki inteligentajn personojn en la nuntempa mondo. Multaj aferoj ŝanĝiĝis. La facileco kaj simpleco, kiuj ebligas lerni kaj utiligi

Esperanton multoble pli rapide ol la anglan, fariĝis malpli signifa avantaĝo en ĉiuj terenoj:

*Tradukado* – komputilaj aŭtomataj traduk-programoj ebligas tradukadon inter multaj lingvoj per tuŝo de butono, je pli kaj pli bona nivelo. Kvankam la rezulto ankoraŭ ne estas perfekta, ĝi almenaŭ povas servi kiel baza malmetaĵo, laŭbezone polurebla de homa tradukisto.

*Lernado de fremdaj lingvoj* – multmediaj kaj retaj lingvokursoj (kiel *lernu!* en Esperanto) ekzistas por multaj lingvoj kaj estas senpagaj, facilaj kaj alireblaj de ĉiuj. Dank’ al kino, televido, furor-muziko, sociaj retoj kaj vojaĝado la nuntempa junularo pli multe kaj volonte sorbas la anglan kaj aliajn grandajn lingvojn kiel la hispanan ol en antaŭaj generacioj.

*La neŭtraleco*, kiu estis tre grava argumento en la dividita, naciisma mondo de la epoko de malvarma milito, perdis sian gravecon en la nova erao de la supernacia tutmondiĝo kaj globala vilaĝo. Pro la absoluta hegemonio de la angla en la ekonomio kaj scienco post la dua mondmilito preskaŭ la tuta mondo prioritare eklernas ĝin kiel unuan fremdlingvon, kaj samtempe ĝi influas la naciajn lingvojn (Rosenhouse & Kowner 2010). Eĉ naciismaj registaroj, kiel tiu de Ĉinio, konscias pri la utileco de la angla kaj zorge instruas ĝin al siaj eksterlandaj deĵorantoj en la komerco, ekonomio, diplomatio, teknologio k.t.p.

## Malfacilaj demandoj: Ĉu, kiel kaj kial tamen Esperanto?

Por ŝanĝi la malnovajn malaktualiĝintajn metodojn kaj dogmojn de informado kaj varbado pri Esperanto, necesas ke ĝiaj aktivuloj alfrontu la novan mondon kaj realisme konsciu pri la efektiva situacio de Esperanto en la nuntempa mondo. Ni ne hezitu levi kaj honeste respondi plurajn malfacilajn demandojn:

- Kiel tamen la Esperanto-komunumo ŝajne restas viva kaj eĉ kreskas kaj evoluas, kvankam ene de malgranda grupo?
- Ĉu la ĉefa motoro por tiu ekzisto estas idea amikeco–samideaneco? Aŭ eble, pli ĝuste, sekteco? Aŭ eble moderna versio de homaranismo? Ĉu en niaj kluboj, renkontiĝoj kaj grupoj ni ne estas efektive izolitaj de la ekstera mondo, kiu apenaŭ aŭdis pri Esperanto kaj plejparte kredas ke temas pri fiaskinta ideo kaj morta lingvo (vidu ekzemple Piron 1988)?
- Ĉu la nunaj stato kaj agado de Esperanto sufiĉas por ke ĝi havu realan ŝancon iam fariĝi signifa internacia lingvo, uzata ne nur idealisme inter kelkmiloj da aktivaj samideanoj, sed profitcele de amasoj?
- Ĉu Esperanto povos iam – eĉ en fora estonteco – okupi la rolon kiun la angla ŝajne ludas en la lastaj jardekoj pli kaj pli?
- Ĉu la mondo vere bezonas neŭtralan planlingvon por solvi siajn komunikajn problemojn? Ĉu iu varianto de vaste uzata etna lingvo kiel la angla ne povas same plenumi tiun rolon?

- Ĉu Esperanto vere bezonas aspiri al iuspeca “fina venko”? Ĉu por konservi la unikecon de Esperanto kiel vivanta planlingvo ne sufiĉas, aŭ eĉ preferindas, “fosi sian sulkon”, kiel pledas, ekzemple, la Raŭmismo?

## Ĉu du polusoj?

Ŝajne ni devas provi realisme kaj sincere elekti inter du kontraŭaj vidpunktoj, respondante al ses demandoj:

1. Ĉu la horizonto estas verda aŭ angla? Ĉu la Zamenhofan vizion atendas realiĝo kaj venko (eĉ se ne fina) aŭ seniluziiĝo?
2. Ĉu (kaj kiel) Esperanto sukcesos adapti sin al la nova reta, globala, malidealisma, materialisma epoko?
3. Ĉu (kaj kial) la tendenco de kreskanta lingva hegemonio de la angla estas jam nehaltigebla?
4. Ĉu entute la angla kaj Esperanto devas konkurenci?
5. Ĉu (kaj kiel) Esperanto povas havi propran unikan niĉon en mondo regata en preskaŭ ĉiu tereno de la angla lingvo?
6. Ĉu post kvindek jaroj UEA havos cent membrojn aŭ cent mil?

## Debato

En la publika debato inter tiuj kontraŭaj situacioj, okazinta en la Esperantologia konferenco en Havano, pledis por la angla José Antonio Vergara (Ĉilio), Jukka Pietiläinen (Finnlando) kaj Probal Dasgupta (Barato). Por Esperanto pledis Ŝai Mor (Kanado), Geraldo Mattos (Brazilo) kaj Ana Ĉumbelić-Rössum (Danlando).

La enkonduka prelego “Esperanto kiel internacia lingvo en la ombro de la angla” kaj la posta debato estas rete videblaj ĉe Ipernity (Wandel 2010b). La debatantoj estis limigitaj al du minutoj kaj devis defendi poziciojn kiujn ili ricevis anticipe (ne nepre tiujn kiujn ili mem subtenas) sed tamen sukcesis bone argumenti. La pledantoj por la angla emfazis ke gravas la nombro de parolantoj, kaj la nunan superecon de la angla en ĉiuj branĉoj de la internacia agado kaj komunikado. Esperanto estas bona ideo, sed ni devas akcepti la realecon — ke ĝi ĉiam estis kaj restis lingvo kaj revo de tre malgranda grupo.

La pledantoj por Esperanto argumentis ke same kiel en la pasinteco regis aliaj lingvoj, ankaŭ la nuna pozicio de la angla povas ŝanĝiĝi. La franca lingvo regis dum ĉirkaŭ tri jarcentoj, dum la angla dominas dum malpli ol jarcento. Eble post kelkdekoj da jaroj la ĉina fariĝos la plej uzata en la internacia komunikado. Eĉ se la angla plu regos en la ĉefaj branĉoj de homa agado, Esperanto ja povas okupi specifan niĉon, kiel ekzemple tradukado.

## La meza vojo

Pro la akceliĝanta evoluo de la homa socio, la internacia komunikado kaj la tut-mondiĝo ni eble konos la respondojn al tiuj demandoj en ne tro fora estonteco. Tamen, verŝajne kiel ĉiam, tiu respondo ne estos nigra-verda kaj ne iros al unu el la du supre prezentitaj ekstremaj ebloj. Ni provu realisme kaj sobre taksi la respondojn al la ses ĉi-supraj demandoj:

1. Ĉu la horizonto estas verda aŭ angla?

Verŝajne nek-nek. Certe ne verda, sed eble ankaŭ ne ruĝ-blua-blanka (la koloroj de la brita kaj usona flagoj). Unu eblo estas ke la mondo fariĝos plur-polusa, plur-lingva, aŭ ke simile al la pasinta situacio, pluraj lingvoj regos plurajn terenojn. Ekzemple, la scienco restos dominata de la angla, la komercon regos la ĉina, kaj la arton regos la hispana. En tia mondo, logika, komputileca planlingvo kiel Esperanto povus okupi la tradukan, interlingvan niĉon. Alia eblo estas ke la angla aŭ iu varianta aŭ piĝina ĵargono de ĝi ja fariĝos la internacia komunikilo, agnoskata de ĉiuj popoloj, kiuj eventuale iom post iom perdos sian nacian karakteron kaj fariĝos unu regno. Aldona lingvo, eĉ se neŭtrala kaj plej facila, ŝajnas superflua. En tia mondo, la Zamenhofan vizion plenumos la reganta lingvo, la popoloj ne plu estos dividitaj, kaj komprenos unu la alian sen bezono de neŭtrala lingva fundamento.

2. Ĉu (kaj kiel) Esperanto sukcesos adapti sin al la nova reta, globala, malidealisma, materialisma epoko?

Evidente Esperanto devos grandparte forlasi la antaŭajn sloganojn, kaj trovi la niĉojn kie ĝiaj lingvaj avantaĝoj, kiel efika strukturo, konciza kaj senescepta gramatiko, klara elparolo kaj fonemfidelo, kaj ŝparema, kompakta vortaro estos plej elstaraj, kiel ekzemple traduka perilo aŭ lingvo rapide kaj facile instruebla por specifaj celoj, kiel mult-etnaj konferencoj aŭ kompanioj, alfabetigo de multdialektaj tribaj medioj k.t.p.

Alia niĉo estos la sociaj internaciaj retoj. Jam nun en Facebook pli kaj pli videblas nacilingvaj tekstoj. Ŝajnas ke la diversaj etnaj alfabetoj, ebligataj per la novaj komputilaj rimedoj, estas volonte uzataj kaj foje eĉ preferataj de uzantoj kiuj kapablas komuniki ankaŭ en la angla. Ĉu por konservi la nacian komunikadon inter samnaciaj geamikoj, ĉu kiel protesto kontraŭ la ŝablonigo kaj unuecigo de la komunikado? Tiun duan celon povos servi ankaŭ Esperanto, des pli se temos pri konversacio en internacia plurlingva rondo.

3. Ĉu la tendenco de kreskanta lingva hegemonio de la angla estas nehaltigebla?

Tiel la situacio aspektas nuntempe, sed pensu pri klerulo en la romia imperio, aŭ eĉ de la mezepoko — li certe ne povus imagi mondon en kiu la latina estas preskaŭ morta kaj forgesata lingvo, anstataŭata per lingvo de malgrava tribaro loĝanta en fora insulo en nordokcidenta Eŭropo . . . Kvantam nuntempe ŝajnas ke nenio povas renversi la tendencon de ekspansio de la angla lingvo al ĉiuj terenoj de internacia komunikado, precipe en la interreto,

ekonomio, scienco kaj politiko, tiu situacio ekzistas nur dum kelkaj jardekoj, relative mallonga tempo en la homa historio. Cetere, daŭre la plimulto de la monda loĝantaro parolas aliajn lingvojn. Certe la Esperanto-movado ne povas haltigi la ekspansion de la angla lingvo, sed ne estas maleble ke aperos pli influaj kaj potencaj faktoroj, kiuj ŝanĝos la mondan soci-politikan situacion kaj la lingvan ekvilibron.

4. Ĉu entute la angla kaj Esperanto devas konkurenci?

Esperanto, kiel dirite, nek devas nek povas konkurenci kun ajna etna lingvo, sed devas trovi sian apartan niĉon en kiu ĝiaj avantaĝoj logos la homojn ĝin preferi kaj utiligi (vidu ekzemple Tonkin 1987).

5. Ĉu (kaj kiel) Esperanto povas havi propran unikan niĉon en mondo regata de la angla lingvo?

Certe troveblas tiaj niĉoj, anguletoj for de la amas-komunikado, en kiuj Esperanto povus montri kaj emfazi siajn avantaĝojn. Ekzemple:

- pera lingvo por tradukado;
- amika turismo kaj vojaĝado trans lingvaj kaj kulturaj limoj;
- lingva kaj socia fenomeno, kiel la sola sukcesinta kaj daŭre vivanta plan-lingvo;
- aktiva en la interreto (vidu ekzemple van Dijk 2010) kaj en scienco (Wandel 2010a);
- ideoj ligitaj al lingvaj rajtoj kaj lingva justeco (vidu ekzemple Skutnabb-Kangas 2000).

6. Ĉu post kvindek jaroj UEA havos cent membrojn aŭ cent mil?

Tio estas tre spekulativa demando. Tamen, mi riskas taksi (aŭ pli ĝuste diveni) ke, se UEA ekzistos post kvindek jaroj, ĝi havos mil tradiciajn membrojn, dekmilon da retaj membroj, kaj cent mil amikojn en Facebook.

## Dankoj

Mi dankas la debatintojn, kiuj konsentis, kadre de la debato, prezenti argumentojn por pozicioj kiuj ne nepre kongruis kun iliaj propraj, kaj al d-ro Tsvi Sadan por suplementaj referencoj.

## Bibliografio

- Ammon, U. (ed., 2001). *The Dominance of English as a Language of Science: Effects on Other Languages and Language Communities*. Berlino: Mouton de Gruyter.
- Baláž, P. (2010). 21-a jarcento — ĉu la Esperanto-movado pretas? **En:** Blanke & Lins (red., 2010:771–775).
- Blanke, D.; Lins, U., (red., 2010). *La arto labori kune*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.



- Crystal, D. (2003). *English as a Global Language*. Kembrigo: Cambridge University Press.
- van Dijk, Z. (2010). The geek shall inherit the earth: Esperanto-movado kaj vikipedia komunumo en la epoko de la Interreto. **En:** Blanke & Lins (red., 2010:574–581).
- Jenkins, J. (2007). *English as a Lingua Franca: Attitude and Identity*. Oksfordo: Oxford University Press.
- Pietiläinen, J. (2010). Plurlingvismo kaj Esperanto: Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado. **En:** Blanke & Lins (red., 2010:781–792).
- Piron, C. (1988). *Psikologiaj reagoj al Esperanto*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (E-dokumentoj, 26E)
- Phillipson, R. (1992). *Linguistic Imperialism*. Oksfordo: Oxford University Press.
- Phillipson, R. (2003). *English-Only Europe? Challenging Language Policy*. Londono: Routledge.
- Rosenhouse, J.; Kowner, R. (red., 2010). *English and Globalization: The Effect of English on Other Languages*. Amsterdamo: John Benjamins.
- Rubdy, R.; Saraceni, M. (red., 2006). *English in the World*. Londono: Continuum.
- Skutnabb-Kangas, T. (2000). *Linguistic Genocide in Education — or Worldwide Diversity and Human Rights?* Mahwah, NJ, USA: Lawrence Erlbaum.
- Tonkin, H. (1987). Esperanto kaj la angla lingvo: du lingvoj kun diversaj celoj. **En:** *Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo*, pp. 117–122. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.
- Wandel, A. (2010a). Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato. **En:** Blanke & Lins (red., 2010:636–643).
- Wandel, A. (2010b). <http://www.ipernity.com/doc/97850/9056003>;  
<http://www.ipernity.com/doc/97850/9056201>

Amri Wandel estas membro de la Akademio de Esperanto, profesoro pri astrofiziko ĉe la Universitato de Jerusalemo, Israelo, kaj gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Los-Anĝeleso, Usono. Li estas estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado (1995–1998, 2004–2007 kaj ekde 2010), sekretario de la Internacia Kongresa Universitato, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj redaktoro de *Israela Esperantisto*.